# Novjorka Prismo

**Numero 117** **Oktobro 2002**


*La Esperanto-Societo de Novjorko*
*kore invitas vin al sia oktobra kunveno.*

DATO: Vendredon, la 18-an de oktobro 2002, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
2nd floor (check schedule in lobby for room number)

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

**7:00 – Geografia Rondo! Ĉiu ĉeestanto kunportu rakonton aŭ priskribon pri sia plej ŝatata lando, regiono, aŭ urbo. ★**

## Protokolo de la kunveno de la 20-a de septembro 2002

Tomaso ECCARDT oficiale malfermis la kunvenon je la 7-a horo ptm. Li esprimis la esperon, ke ni ĉiuj pasigis bonan someron. 16 personoj ĉeestis la kunvenon, neniuj gastoj. Tomaso demandis, ĉu la ĉeestantoj ricevis *Novjorkan Prismon*. La protokolo estis akceptata. Oni menciis, ke la nomo de la organizo menciita en la artikolo pri la regiona kunveno en Okemo estas ISE, ne IES.

Tomaso menciis, ke ne multaj personoj ĉeestis la somerajn eventojn.

Nijl BLONSTEIN menciis, ke Arnold VICTOR organizas ĉambron ĉe Okemo.

Eugene MARKOV, la ĉi-jara ĉefo de la kandidatiga komitato de nia klubo, laŭtlegis angle el la statuto de nia Societo pri la proceduro por elekti estraranojn.

Tomaso menciis, ke unu studanto el la klaso de komencantoj volas iri al Okemo. Tomaso sugestis, ke personoj, kiuj volas partopreni en la nova konversacia rondo, kopiu la libron *Gerda Malaperis* el la interreto. Rochelle F. GROSSMAN ricevis poŝtkarton de Laura MILLER, kiu vojaĝis al Irlando kaj vizitis Ken KIBBLE, kiu ludis flaŭton ĉe unu el niaj kunvenoj antaŭ unu aŭ du jaroj.

Rochelle menciis, ke la venontjara Universala Kongreso de Esperanto okazos en Goteborgo, Svedio, kaj okazos speciala Tut-Amerika kunveno en Havano, Kubo, en 2004. Alex KARKOVSKY menciis, ke li ricevis tradukon de verko de Eroŝenko, tradukita en la rusan. Eroŝenko skribis la verkon originale en la japana.

Je 7:36 ptm, Nijl komencis sian prelegon pri siaj ĉi-someraj spertoj en Brazilo. Je kelkaj momentoj dum la prelego, Nijl montris al ni partojn de tri vidbendoj, kiujn li faris dum la du kongresoj, kiujn li ĉeestis, la Universalan Kongreson en Fortaleza, kaj ankaŭ la junularan kongreson en Patobranko. Li restis en Brazilo 40 tagojn. Dum 6-7 tagoj, li estis kun personoj, kiuj parolas nur la portugalan lingvon. Nijl, kiu jam lernis la hispanan, formis regulojn pri la diferencoj inter la hispana kaj la portugala, kaj aplikis tiujn regulojn por komuniki dum tiu periodo en sia vojaĝo. Li menciis, ke la vetero en 20 pocento de la lando ne estas tropika, kaj li iam devis dormi vestita en "vintra" jako.

Li vizitis multajn indiĝenajn lokojn, kies nomoj havas la akcenton je la lasta silabo. La hotel-ĉambroj, kie li restis, estis tre malmultekostaj, ĉirkaŭ 10-15 dolaroj. Multaj esperantistoj, kiujn Nijl renkontis tie, apartenas al la spiritisma movado, tio estas, ili parolas kun mortintoj.





Li vizitis nek Sao Paolo nek Rio de Janiero. Li flugis el Brazilio al Fortaleza. Li montris al ni artikolon en brazila jurnalo *Istoe*, kie oni intervjuis lin pri Esperanto. Li kunportis centojn da fotoj al la kunveno. La vidbendoj montris prelegojn, dancadon, teatraĵojn, muzikajn ludojn, klasojn, kaj eĉ viziton al fabriko de fornoj, enmetataj en skatolojn reklamante pri la valoro de Esperanto.

Je 8:48, Nijl finis la prelegon. Tuj poste, Rochelle penis aŭkcii tre utilan sakon, kiun ŝi ricevis en Fortaleza. Neniu volis aĉeti la sakon, do ŝi gardis ĝin. Poste, Nijl trovis parton de vidbendo, en kiu esperantistoj kantis la bone konatan kanton "Brazil." Je 8:57 ptm, Tomaso oficiale fermis la kunvenon.

Post la kunveno, kelkaj ĉeestantoj iris al nia kutima pica-restoracio-manĝaĵ-vendejo por manĝi kaj trinki. Tamen, la nomo ne restis same kiel antaŭe. La nova nomo de la restoracio estas "Emma's Dilemma." La aspekto de la restoracio multe ŝanĝiĝis, sed ĝi daŭre vendas la samajn aferojn kiel antaŭe. ★

*Protokolis:*
*Stuart GREEN*

## Novjara karto alvenos vin el Japanio

Karaj geamikoj,

Sube bonvolu legi e-poŝton de mia fratino Yoko en Tokio, kiu volontule instruas Esperanton en sia najbara lernejo. Se vi konsentas kun ŝia ideo, bonvolu helpi ŝin. Koran dankon!

– *Maki SANO*

Al samideanoj Esperantaj:

Mi nomiĝas "sano", kiu instruas Esperanton senpage kaj volontule en najbara mezlernejo al 33 gelernantoj, kiuj estas 13-15 jaraĝaj. Ili eklernis Esperanton dum 90 minutoj nur du foje ekde junio. Do, mi petas, ke Maki kaj ŝiaj Esperantaj amikoj skribu bonvole novjaran karton simplan kaj mallongan al unu aŭ du lernantoj.

Tiu-maniere, lernantoj fariĝos semoj de esperantistoj estontaj. Unue, bonvolu sendi viajn adresojn al la gvidanto "sano" rete: PDF02646@nifty.com aŭ per via amiko Maki Sano ĝis kiam (je Nov.10) okazos venonta kurso. La adresoj estos kopiota kaj skribota per lernantoj, kiuj deziras provi mem kapablojn de Esperanto. Kaj vi ricevos novjar-saluton el juna japana lernanto. tiel sube:

Mi estas (la nomo de lernanto); mi havas (bestojn aŭ iujn); mi ŝatas (lernadon); kaj vi? Feliĉan novjaron 2003 al vi.

Estas facilege, ĉu ne? (Tro facile?) Ili ankaŭ zorgas lerninde vian kotizon de poŝtmarko por respondo. La lernantoj ne povus daŭrigi skribadon multefoje, probable povos nur unu fojan skribadon. Ĉar finiĝos la kurso post 2 fojon je Jan. kaj Feb. en 2003. Ni atendos vian konsenton al nia plano, kaj vian adreson. Antaŭdanke, via, "sano" unu el la gvidantoj de mezlerneja Esperanta Kurso PDF02646@nifty.com apartenas al Niŝitama-Esperanto-kai, okcidenta Tokio, Japanio



*http://www.bongo.ne.jp/ÅPteg/nisitama/*

## IBM Plaza

Kvin geesperantistoj kuniĝis en la agrabla eks-IBM konstruaĵo je la sesa de oktobro. Ni priparolis multajn aferojn, inkluzive la nuntempajn novaĵojn, kaj la birdetojn kaj arbojn, kiuj honoras la internan ĝardenon kie ni renkontiĝas.

– *Tom ECCARDT*

## (R)estu membro de la E-komunumo!

Mi volas rediri al vi, kial indas esti kaj resti membro de la Esperanto-komunumo. La samon pli-malpli mi jam diris pasintjare, kaj mi restas nun samopinianta. Esence al la ĉiama demando: "Kial finfine mi devus aliĝi al la loka Esperanto-klubo, al la nacia landa asocio, al la asocio de mia fako aŭ hobio, al Universala Esperanto-Asocio?" mi kutimas respondi, ke ekzistas almenaŭ du kialoj:

1) La Esperanto-asocioj je ĉiuj niveloj laboras por pli bona mondo, por mondo sen lingva kaj kultura diskriminacio; mallonge dirite, ili laboras por lingva demokratio. Se vi opinias, ke tiu estas bona celo, vi certe volas subteni ilin. Aliĝante al via loka klubo aŭ al monda, nacia aŭ faka asocio (eventuale eĉ al ĉiuj tiuj), vi estos parto de tiu tutmonda Esperanto-movado, kiu de pli ol unu jarcento laboras por homaj lingvaj rajtoj je ĉiuj niveloj, kaj kiu provas konvinki la mondon, ke ankaŭ en la lingva-kultura kampo justeco valoras pli ol forto.

2) Samtempe vi eble ŝatas simple esti parto de la komunumo, kiu parolas la internacian lingvon Esperanto. Vi eble ŝatas renkonti aliajn parolantojn de Esperanto, vi ŝatas aĉeti librojn en Esperanto, vi ŝatas vojaĝi al fremdaj landoj, koni ties loĝantojn kaj eventuale eĉ esti gastigata de lokaj esperantistoj. Ĉion ĉi la membroj de Esperanto-asocioj faras des pli nature, estante daŭre informataj per siaj asociaj ligoj pri la revuoj, la libroj, la kongresoj, la ret-listoj kaj la ret-paĝoj, la korespond-anoncoj kaj la vojaĝ-ebloj je sia dispono. Kaj se vi apartenas al la komunumo de tiuj, kiuj normale ŝaltas sian komputilon antaŭ la matenmanĝo, vi trovos (aŭ jam trovis), ke esperantistoj ĉeestas pli kaj pli en la tutmonda reto kaj serĉas kontaktojn kun similaj esperantistoj. La avantaĝoj de asocia membreco estas similaj ankaŭ ĉi-kaze. Ekzistas diversaj diskutgrupoj por UEA-membroj, ekzemple, kaj nuntempe ankaŭ eksperimenta eblo ricevi la revuon Esperanto per Interreto en komputila formato.

Do estas grave, ke vi klopodu aliĝi al Esperanto-organizaĵoj je ĉiuj niveloj (loka, landa, faka aŭ internacia). Ni kompreneble invitas vin aliĝi aŭ re-aliĝi al UEA, sed ankaŭ se vi aliĝas nur al faka asocio aŭ al via loka klubo, tio jam estas io bona; kaj se vi aliĝas ankaŭ al via landa asocio, tio estas io ankoraŭ pli bona, ktp.



UEA pretas ĉiukaze sendi al aranĝantoj de naciaj aŭ lokaj renkontiĝoj stokon da revuoj de UEA de la pasinta jaro kune kun cirkuleroj por disdonado al la partoprenantoj – oni devas tiurilate nur peti la Centran Oficejon. La celo de nia kampanjo estas "vastigi la komunumon", tio estas vastigi la nombron de organizitaj kaj interligitaj esperantistoj je ĉiu nivelo. Nia ĉefa celo estas ke la membroj de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj pliiĝu kaj estu en kontakto inter si. Oni vastigas la komunumon ĉefe per informado pri Esperanto kaj instruado de Esperanto, sed ankaŭ tio estas senefika en la longa daŭro, se la parolantoj de Esperanto ne poste iel restas kune.

Ni restas je via dispono por kunlabori kun vi pri tiu ĉi celo.

– *Renato Corsetti, Prezidanto de UEA*

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

### Oktobro

**Beginners Esperanto course continues**
*Sundays, 6:45 pm at the K-Café*

**18** — **ESNY KUNVENO**
**Niaj plej ŝatataj urboj, landoj, kaj regionoj**
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

### Novembro

**3** — **Tagmanĝo**
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM*
(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 118)

**15** — **ESNY Kunveno**
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**United Federation of Teachers** (UFT)
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)

**"IBM" Building Atrium** (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

**K-Café**
Second floor of K-Mart, 770 Broadway, NYC
(entrance at Eighth Street & Fourth Avenue)


ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

**Prezidanto** Thomas Eccardt (212) 477-6516
**Koresponda Sekretariino** Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
**Protokolisto** Stuart Green (631) 751-5683
**Vicprezidanto** Thomas Leong (718) 981-4252
**Kasistino** Sofiya Soskina (914) 738-6084
**Program-Direktoro** Arturo Bonetti (718) 257-6091



**Novjorka Prismo**
Numero 117 – Oktobro 2002
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

**Redaktoro** Jim Medrano (212) 982-5029
**Subredaktoroj** Thomas Eccardt, Nancee Medrano
**Desegnistino** Mary Pulley

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com


© 2002 Esperanto Society of New York